

PENSEO

N-ro 231

jan. / 2011

Monata Beletra Revueto en Esperanto

Honorita de Premio Grabowski,1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 22-a jaro http://www.elerno.cn/penseo/penlisto.htm

Erzsébet Tuboly (Hungarujo)

Hajkoj kaj floroj

1.

Estas somero
Bunta papilio dancas
Sur la lavendo
Bunta papilio
Dancadas kun zefiro
Senombra brilo
Lilaj lavendoj
Alloge bonodoras
Dancas papilio

2.

Velkanta rozo
Akra sunbrilo murdas
Ĝin, flora sorto

3.

Matena roso
Larmogutojn feinajn
Ploras la rozo?

4.

Sur ruĝaj rozoj
Magiaj kristalgloboj
Brilas rosgutoj

5.

Jen rozo brilas
Sur ĝi aventurema
Formiko iras
Sur flava rozo
Brilas kristalglobetoj
Forpasis pluvo

Maria Konopnicka (1842-1901)

AMATA DOM' GEPATRA DOM'

Amata dom', gepatra dom',
Ci somernokte, en la vent',
Per tili'-voĉ' dormigas min
Kaj viŝas larmojn en silent'.

Amata dom sub pajl-tegment',
De olda port' gepatra sojl'
Rakontas pri iama temp',
Salutas min el dorna voj'

Amata dom' kaj bonodor'
De freŝa fojn', matura gran'
Humida popl', kampara roz',

Interplektita kun kratag’

Amata dom’, nigra arbar’,
La fiera kant’ de l’ susur’
Fantom-ĝemoj de venta ĥor’
Ekbolas ene mia sang’

Amata dom’, gepatra dom’
En tempesto, en duba tag’,
Dume animon frapas fulm’
Memor’ pri ci ja savas min.

Se amas mi, se volas mi,
trovi la panon en ĉi dom’,
Kun kor' mi vartu ĉe ĉi sojl’
En ĉi muroj ripozu kor’

Esperantigis

Helena Tylipska (Italujo)

Mercedes Sosa (1935-2009)

Vagabonda kor’

Sen ĉes' en mi batas ĉi kor'
kun kiom da fervor’,
ke bonŝanc' ne forgesu min.

Ĉi eta kor’ estas ne nur
memorinda plezur’
de loga figur’ de virin’

en songĝ' al mi veninta, min lasinta for,
kun la vizaĝ' en plor',
kvazaŭ ploro sen fin'.

Volas ĉi kor', vagabondo,
ke sin gardu l' mondo
en min.

Esperantigis

Wel (Brazilo)

Eratumo: En la lasta numero de Penseo ĉe poemo *Pereo* oni konsideru la duan verson de la unua strofo kiel: ŝipon al mar', ne por navigi [anstataŭ 'la ŝip' al mar', ne por navigi'] (Noto de la tradukinto)

Petőfi Sándor (1822-1849)

Ribelas nun la mar'

Ribelas nun la griza mar',
La maro de l' popol',
Al nuboj, al la granda mond'
Kruele batas ĉiu ond',
Frenezas brue kun amar'.

Rabias - ĉu - la jena kant'?
Ĉu tondras la muzik’?
Kiuj respekti ĝin ne povis,
La forton de l' popolo trovis,

Amuzas sin nun ĝia land'.

Jen ŝaŭme ŝtormas la muĝa mar",
Ĵetiĝas ĉiu ŝip'
Falanta ĝis infero bruta,
Rompiĝis masto, jam kaduka,
Mortkrias laŭte personar'.

Ho, maro, nun el vi fontu plag',
Ataku al la mond'!
Englutu ĉion ĝis la fundo,
Elĵetu akvon kun abundo,
Terure bolu via ag'!

Ĉiele skribu por la homar'
Por instru', por ĉiam:
Vane la barko supre fortas,
Pezon de ŝipo akvo portas,
Tamen do regas nur la mar'.

Esperantigis

V I Z I László

(Hungarujo)

Sankta Vivopatrin'

(Boldogasszony Anyánk)

1.
Sankta Vivopatrin' ĉiam nin savanta!
Vokas vin la patruj' en mizero granda.
Pri nia patruj', kara Hungaruj',
ne forgesu pri ni, hungaroj suferaj!

2.
Kara, bela filin' de la Patrodio,
por Jesuo patrin', amo de l' Spirito.
Pri nia patruj', kara Hungaruj',
ne forgesu pri ni, hungaroj suferaj!

3.
Pro la multa ĝemad' krevas la ĉielo.
estu por ni egid' via savmantelo!
Pri nia patruj', kara Hungaruj',
ne forgesu pri ni, hungaroj suferaj!

4.
Turnu al ni helpem' vian okulparon,
helpu grace al ben' vian hungararon!
Pri nia patruj', kara Hungaruj',
ne forgesu pri ni, hungaroj suferaj!

5.
Plore ploras anim' de la orfaj sinoj,
pro pereo de l' land' koro de vivdvinoj!
Pri nia patruj', kara Hungaruj',
ne forgesu pri ni, hungaroj suferaj!

6.
Prenu for el la land' nian mizeregon,
donu kun komptemv, donu pacan regon!
Pri nia patruj', kara Hungaruj',
ne forgesu pri ni, hungaroj suferaj!

7.
Sarku, kara Patrin', tute la herezon,
el hungara naci' la malkredemecon!
Pri nia patruj', kara Hungaruj',
ne forgesu pri ni, hungaroj suferaj!

8.
Kiel la praular' gloris vin adore,
ankaŭ nun la idar' preĝas vin honore.
Pri nia patruj', kara Hungaruj',
ne forgesu pri ni, hungaroj suferaj!

9.
Reĝo Sankta Stefan' vin herede donis,
Ladislao tuj post' al vi nin ordonis.
Pri nia patruj', kara Hungaruj',
ne forgesu pri ni, hungaroj suferaj!

10.
Kulpis multe ni jam kontraŭ via Filo,
preĝu por nia kred', nia rehumilo!
Pri nia patruj', kara Hungaruj',
ne forgesu pri ni, hungaroj suferaj!

Elhungarigis

Imre Szabó

(Hungarujo).

Edna St. Vincent Millay (1892-1950)

Konscienca Rifuzanto

(Prozpoemo)

Mi mortos, sed
tio estos ĉio, kion mi faros por Morto.
Mi aŭdas. Li kondukas sian ĉevalon el la stalo.
Mi aŭdas la hufklakadon sur la stalplankon.
Li rapidas. Li havas aferon en Kubo,
aferon en la Balkanoj, kaj ĉi-matene multajn aliajn vizitojn.
Sed me ne tenos la bridon
kiam li firmigas la selzonon.
Kaj li mem enseliĝu;
Mi ne helpos lin.

Se li frapetus miajn ŝultrojn per vipilo
Mi ne dirus al li, kien la vulpo kuris.
Si lia hufo subpremus mian bruston, mi ne dirus al li,
kie la nigra knabo kaŝas sin en la marĉo.
Mi mortos, sed tio estos ĉio, kion mi faros por Morto.
Mi ne estas lia dungito.

Mi ne sciigos lin pri la lokoj de miaj amikoj,
Nek de miaj malamikoj.
Kvankam li promesas multe al mi,
mi ne mapigos la vojon al ies pordo.
Ĉu mi estas spiono inter la vivuloj,
Ke mi liveru ilin al Morto?
Frato, mi tenos sekure la pasvorton kaj skemojn de nia urbo.
Neniu venkos vin pro mi.

Esperantigis **Lariko (Usono)**

Dek poemoj de Hanshan*

1.

Legantoj de poemoj miaj
prizorgu vin kun pura kor’,
Reduktu vian avidemon,
Korektu flaton kun fervor’
Forigu la malvirtojn de vi
Vin tenu al vera humor’.
Nun vi ekhavas budhan korpon
Rapide agu de ĉi hor’.

2.

Loĝejon fiksis mi sub pendrok’
Kun bird-flugad’ sen vojo homa.
Nubaro blanka volvas ŝtonojn
En la kvieta korto doma.
Dum jaroj tie ĉi mi ĝuas
Ripeton de ŝanĝad’ sezona.

Admonon al la bonhavuloj:
Ja malutilas vant’ renoma.

3.

Sur la voj’ de l’ Frosta Monto
Troviĝas ne ĉevalĉara spur’.
Kunflu’ de rojoj miskondukas,
Montvicoj ja sennombras nur.
Mil herboj ploras jen kun rosoj,
Suspiras pinoj sen plezur’.
Ĉe voj-perdiĝo Formo ĉuas
Al Ombro kien ties kur’.

4.

Mi vivas kiel mont-ermito
Kun la loĝej’ for de hom-bru’.
Tretitaj herboj formas vojojn
Najbaras blank-nuboj en flu’.
Bird-ĉirpo paras mian kanton,
Ne ĉuas hom’ pri Budh-instru’.
Nuntempa bodhi-arb’ postlonge
Printempon ornamos kun ĝu’.

5.

Liut’ kaj libroj por ermito,
Riĉec’ kaj rang’ ja sen utilo.
Edzinon sindoneman sekvu ,
En ĉaro rajdu bona filo.
Konfuzas vent’ tritikdraŝejon,
Fiŝejo ŝaŭmas sen trankvilo.
Memoru troglotidon ofte,
Ĝi nestas sur solbranĉ’ kun trilo.

6.

Legendas fratoj el kvin lokoj,
Kaj patr’ kaj filoj en domfond’
Kiel fidelaj du naĝbirdoj
Blanka lepor’ en vagabond’.
Melonon kaj oranĝon feajn
Ricevis ja vi en songmond’.
Jen malproksime de hejmtero
Vi naĝas kun fiŝar’ en ond’.

7.

Lertulo de penik’ kaj spado
Renkontis saĝajn mastrojn tri.
Nek liaj pens’ bonvenas tie
Nek lia skermo tie ĉi.
Li majstras en penik’ kaj spado
Kaj amas ambaŭ kun pasi’.
Nun li jam estas maljunulo,
ne gravas lasta temp’ de li.

8.

Pri morto Zhuangzi kiel ĉerkon
Volis ĉielon kaj terplaton.
Mi certe mortos iutage,
Bezonos mi nur unu maton.
Per korp’ mi bredos muŝojn, ĝenos
Ne gruojn sendi min al Fato.
Vivante pure mi preferos
Sur Shouyang morti de malsato.

9.

Kiel atingi la Frost-Monton?
Al ĝi la voj’ baritas plene.
Somere regas ja glacio,
Nebulo densas sun-solene.
Kiel mi loĝas en ĉi monto,
Aliaj volas tion ene.
Se iu havas mian senton,
Li tie trovas sin senĝene.

10.

Segitis en tabulojn larĝajn
Cent-futa arbo sub ĉielo.
Domaĝe tiuj lignopecoj
Ĵetitas vale en pelmelo.
Post jaroj ankaŭ ili taŭgas,
Defalas nur iliaj ŝeloj.
Sagacemuloj ilin uzas
Por teni stalon sen ŝancelo.

Elĉinigis

Vejdo (Ĉinio)

**Hanshan (ĉirkaŭ 691-793) estas ĉina fama bonzo-poeto de Tang-dinastio. Liaj poemoj estas laŭritmaj, simplaj kaj facile kompreneblaj.*

Ĉineske

Vejdo (Ĉinio)

Por fina konker'

okaze de Zamenhof-Festo 2010

—laŭ ĉinesk skemo Manjianghong*

ankaŭ kun sent'
la nova
jen al esper'
ni strebas
verdaj fratoj
jen kun fier'
antaŭenmarŝu rekte
por nia granda afer'
senĉese
ni pene agu
kun sincer'

demono
sur la ter'
ankoraŭ
kun danĝer'
tigre minacas
kaj la kancer'
en nia korp' intrigas
kontraŭ esperanta kler'
rapide
ni unuiĝu
por konker'

**Manjianghong (rivero plenruĝa): ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun po 11 versoj de 434,344,77,353 / 33,33,54,77,353 silaboj respektive, laŭ rimarangĝo xxa,xxa,xa,xxa / xa,xa,xa,xa,xxa (x = senrima)*

Viktoro (Ĉinio)

Aŭtuna mozaiko

—laŭ ĉineska skemo Dingfengbo*

granda senforma penik'
pentras en aŭtun-muzik'
flav-nuancoj mistere
vere
aperas en mozaik'

flave, siene, brune
kune
sin montras la vasta ter'
ankaŭ flaveta kolor'
en sor'
drivas en minca aer'

Cindy Mckee (Usono)

Mi portis poŝtelefonon

—laŭ ĉineska skemo Dingfengbo*

Sur monto de prauloj
envolvis nin nebuloj
alkroĉante malseke,
veke
al instinktaj stimuloj.

Sed super solorajto,
trajto
konebla kun precizo
en la informepoko,
loko—
per geolokalizo.

geolocate: geolokalizi

geolocation: 1. La trovita loko: geoloko 2. La

tekniko: geolokalizo
geolocator: geolokalizilo
**Dingfengbo (subigo de ŝtormo): Ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun 5 kaj 6 versoj respektive de 7,7;7,2;7;/ 7,2;7,2;7; silaboj, laŭ rimarnĝo aabba/ccdeed*

Alparolatoj, la minoritatoj

—laŭ ĉineska skemoYiqin'e*
Rezultas,
ke neniu aŭskultas
aŭskultas
nur parolas
kaj insultas.

Porparolantoj multas
kiuj ne nin konsultas
konsultas.
Mutigitaj,
ni tumultas.

Yankee (Ĉinio)

Spektado al neĝado

—laŭ ĉineska skemoYiqin'e
Sur ĉiel'
svage brilas jen kun bel'
jen kun bel'
blanka kristal'
de pika gel'.

Vatpecoj sub venta pel'
flirtas kirle en pelmel'
en pelmel'
drivas fume
falas sen cel'.

**Yiqin'e (memoro pri palaca knabino): ĉina fiksforma poemo de du strofoj kun po 5 versoj de 3,7,3*44 / 7,7,3*,44 silaboj, laŭ rimaranĝo aaA,xa / aaA,xa (x=senrima)*

Niuniu (Ĉinio)

Neĝa festeno

—laŭ ĉineska skemo Langtaosha*
neĝblanka festen'
sur la teren'
aranĝiĝas en solen'
aŭdiĝas ne maĉado
nur bela scen'

bonvola kompren'
pura sentplen'
foriĝis jam la ĉagren'
restas nur kor-elverŝo
sen ajna ĝen'

**Langtaosha (ondo avas sablojn): ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun po 5 versoj de 5,4,7,74 silaboj, laŭ rimaranĝo a,a,a,xa (x=senrima)*

Eto (Ĉinio)

Ruĝaj folioj

—laŭ ĉineska skemo Santaici*
Folioj ruĝiĝas
laŭ bordoj de l' river'
kiel farb' skarlata
ŝpruciĝas super ter'.

Ĉu montoj kaj tero
sub la ruĝa tolo?
Ĉu karminaj nuboj
onde en ventfolo?

Kun ruĝ' prezentas
la pejzaĝon l' amo.

Paron ebriigas
bela panoramo.

Guozhu (Ĉinio)

JARKUNVENO de HEA* 2010

—laŭ ĉinesko Niannujiao (Ĉarma Kantistino)*
Jarfine en/ decembro/ sub Zamenhof-beno,
laŭkutime/ okazis/ nia jarkunveno.
La Espero./ Verda flago./ Raport-bulteno.
Kunfotiĝo/ en festa soleno.//

Poem-deklamo far/ la Esemblo en/ voĉ-sereno.
Ho, Mia Kor'! / impone/ emocia sceno.
Glata ŝanĝo/ de komitatoj/ en ordpleno.
Al nova cel',/ marŝu ni kun peno!

**Niannujiao (ĉarma kantistino): ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun po 11 versoj de 436, 436,445,46 / 654,436,454,46 silaboj, laŭ rimaranĝo xxa, xxa,xxa,xa (x = senrima)*

HEA: Hubei-a Esperanto-Asocio

Maupassant (1850-1893)

Patro Milon

Depost unu monato, la brula suno ĵetas al la kampoj ardajn flamojn. La vivo radianta disfloras sub la priverŝo de flamo. La tero, kiu etendiĝas ĝis la horizonto, estas freŝverda. La vastega ĉielo estas lazura. Rigardate de malproksimo, la normandiaj bienoj, kiuj dissemiĝas sur la ebenaĵo, similas al arbaretoj, ĉirkaŭataj per la heĝo de fagoj maldikaj kaj altaj.

En proksimo, kiam oni puŝmalfermas la lignan barilpordeton vermopikitan, oni vidis grandan ĝardenon, ĉar la antikvaj pomujoj ostecaj kiel kampuloj estas florantaj. En korto la nigraj, kroĉemaj kaj maljunaj trunkoj etendas siajn ruĝetajn kaj blankajn kronojn sub la blua ĉielo. La aromo de freŝaj floroj miksiĝas kun odoro de stalo vaste malfermita kaj kun vaporo de sterkduno, kiu fermentas, kovrata de kokoj.

Tagmeze, la familio tagmanĝas sub la ombro de la pirarbo plantita antaŭ la pordo: patro, patrino, kvar infanoj, du servistinoj kaj tri ĉambristoj. Oni ne multe paloras. Oni unue manĝas supon kaj poste pladon da miksaĵo plena de terpomoj stufita kun lardo. De tempo al tempo servistino stariĝis kaj iras al la kelo por preni pli da cidro.

La viro, kvardek-jara fortikulo, kontemplas la viton, ankoraŭ nudan, kiu rampas kiel serpento laŭlonge de la muro sub la persienoj de lia domo.

Finfine li diras: “La vito de patro burĝonas frue ĉi-jare, eble ĝi portos fruktojn.”

La virino ankaŭ sin turnas kaj pririgardas ĝin, sed sen diri eĉ unu vorton.

Ĉi tiu vito estas plantita tie, kie ilia patro estis pafmortigita.

Tio okazis dum la milito de 1870. Prusoj okupis la tuta landon. La generalo

Faidherbe estis gvidanta armeon de nordo kontraŭstaris kun ili.

Nu, la stabo de la prusa armeo estis establita en ĉi tiu bieno. La posedanto de la bieno estis la patro Pierre Mion, kiu okupiĝis pri akcepto kaj loĝigo al ili laŭ plej granda eblo.

Depost unu monato, la avangardaj trupoj de germana armeo ĉiam faris observadojn en la vilaĝo. La franca armeo, kvardek kilometrojn de ĉi tie, restis senmova. Kaj ĉiunokte ulanoj malaperis.

Ĉiuj skoltoj neniam revenis, se ili nur estis senditaj solaj en du-aŭ-triopo.

Matene oni povis trovi iliajn kadavrojn en kampoj, ĉe la randoj de kortoj, en irigaciaj kanaloj aŭ en fosaĵo. Iliaj ĉevaloj kuŝis laŭlonge de la vojo kun gorĝoj fortranĉitaj.

Tiuj murdoj ŝajne estis faritaj de samaj homoj, kiujn oni ne sukcesis malkovri.

Pro tio la lando teruriĝis. Germana armeo laŭ simpla denunco pafmortigis kamparanojn kaj enprizonigis virinojn. Ili vringis informojn de infanoj per minacaj rimedoj. Sed ili eltrovis nenion.

Sed, iun matenon, oni rimarkis, ke patro Milon kuŝas en sia ĉevalstalo, kun glava vundo sur la vizaĝo.

Oni ankaŭ trovis du mortigitajn ulanojn, kies ventroj estis distranĉitaj, je tri kilometroj for de la bieno. Unu el ili ankoraŭ tenis enmane sangmakulitan sabron. Klare li estis batinta por sin defendi.

Antaŭ la bieno milita tribunalo estis tuj formita sub la libera ĉielo, kaj la maljunulo estis alkondukita.

Je la aĝo de sesdek ok jaroj, li havis malgrasan kaj malgrandan staturon kun iom kurba dorso kaj paro da grandaj manoj kiel pinĉiloj de krabo. Liaj senbrilaj kaj maldensaj haroj, kiel viloj de anasido, malkaŝis lian kranian haŭton tie kaj ĉi tie. La bruna kaj sulketiĝinta haŭto sur la kolo montris dikajn vejnojn, kiuj malaperis sub la makzeloj, Li estis rugardata kuel avarulo, kun kiu oni malfacile tenis bonan rilaton.

Ili lin lokis inter kvar soldatoj, lasis lin stari antaŭ la tablo tirita eksteren el la kuirejo. Kvin oficiroj kaj kolonelo sidis ĝuste kontraŭ li.

La kolonelo parolas en la franca lingvo:

— Patro Milon, depost kiam ni alvenis ĉi tien, ni nur faras laŭdon al vi. Vi ĉiam tre bone traktas nin kaj nin prizorgas kun granda komplezemo. Sed hodiaŭ, grava denuncado koncernas vin, tial vi devas klarigi la aferon. Kiel vi ricevis la vundon je la vizaĝo?

La kamparano respondis nenion.

La kolonelo daŭrigis:

—Via silentado kulpigas vin, patro Milon. Sed mi volas vin respondi al mi, ĉu vi aŭdis? Oni trovis, ke du ulanoj estas mortigitaj hodiaŭ matene proksime de la monto Calvaire, ĉu vi scias kiu mortigis ilin?

La maljunulo neniom ambigue respondis:

— Estas mi.

La kolonelo, surprizite, fikse rigardis al la kaptito dum silenta momento. Patro Milon restis trankvila, kun stulta de kamparano, kaj rigardis malsupren, kvazaŭ parolanta al sia pastro. Sed estis videble, ke li estis sinĝena en sia interno, ĉar li pene glutis salivon fojrefoje, kvazaŭ lia gorĝo estus strangolita.

La tuta familio de la maljunulo, liaj filo Jean, bofilino kaj du malgrandaj infanoj konsternitaj, staris je dek paŝoj malantaŭ li.

La kolonelo ree diris:

— Ĉu vi scias, kiu mortigis la skoltojn de nia armeo, kiujn oni trovas mortaj en ĉiu mateno, sur la kampo, dum unu monato?

La maljunulo respondis kun same senesprima mieno kiel stultulo:

— Estas mi.

— Ili estas mortigitaj de vi?

— Jes, ili estas mortigitaj de mi.

— Vi sola?

— Mi sola.

— Diru ai mi, kiel vi faris tion.

Ĉi-foje la maljunulo aspektis emociite, ĉar neceso paroli longtempe evidente ĝenis lin. Li balbutis:

— Kiel scias do mi nun? Mi tiel faris ĝuste..

La kolonelo daŭriĝis:

— Mi sciigas al vi, ke vi devu elparoli al mi la tutan procezon. Vi devu pli bone fari tujan decidon. Kiel vi komencis tion?

La maljunulo ĵetis maltrankvilan rigardon al sia tuta familio, staranta malantaŭ li. Post momenta hezito, li subite faris decidon.

— Mi revenis hejmen ĉirkaŭ je la oka horo de iu nokto, la sekvanta tago post kiam vi venis ĉi tien. Vi kaj viaj soldatoj prenis de mi furaĝon de pli ol ducent kvindek frankoj, kune kun bovino kaj du ŝafoj. Mi diris al mi: Se ili reefoje prenos aĵojn kun kosto de cent frankoj, mi repagos al ili la tutan sumon. Krome mi ankoraŭ havas aliajn ideojn, kiujn mi diros al vi poste. Tiam mi rimarkis, ke unu el viaj kavalerianoj fumas pipon ĉe la flanko de fosaĵo post mia grenejo. Mi iris dekroĉi falĉileton kaj revenis per malpezaj paŝoj malantaŭ li, tiel ke li neniom aŭdis. Kaj mi forhakis lian kapon per unu svingo, sole per nura svingo, kvazaŭ oni falĉus tritikon, antaŭ ol li povis kriis “uf!”.

Nur se vi iras al la fondo de la lageto serĉi, vi lin povas eltrovi en sako por karbo, kun ŝtono subtenanta palisaron.

— Mi havas mian ideon. Mi demetis ĉiujn liajn vestojn de botoj ĝis milita ĉapo, poste mi ilin kaŝis en la kalkofornon de la arbaro Martin post la korto.

La maljunulo estis muta. La oficiroj ŝtoniĝintaj pro konsterniĝo, rigardis unu al la alia. Jen la procezo de pridemandado:

Depost kiam li mortigis la kavalerianon, li ĉiam havis la penson: “mortigi la prusojn!” Li ilin malamegis kun profunta malamego de monavida kaj patriota kamparano. Ĝuste kiel li diris, li havis sian ideon. Li atendis kelkajn tagojn.

Oni lin lasis libere iri kaj reiri, eniri kaj eliri, ĉar li estis humilema, obeema kaj plaĉema al venkintoj. Ĉiuvespere, li vidis la heroldon eliris. Ĉar li ofte kontaktis kun soldatoj, li ellernis kelkajn necesajn germanajn vortojn. Iun nokton, aŭdiinte la nomon de la vilaĝo, kien la kavalerianoj volis iri, il eliris.

Li eliris de sia korto, glitis en la arbaron, venis al bakforno por kalko, kaj penetris en la finon de la longa tunelo. Eltrovinte la vestojn de la mortinto, li sin vestis per ili.

Poste vagante sur la kampoj, li rampis laŭ la taluso por esti nevidebla, atente aŭskultante al ĉiu brueto, maltrankvila kiel ŝtelĉasisto.

Tuj kiam li opiniis, ke la tempo alvenas, proksimiĝinte al la landvojo, li sin kaŝis en vepro kaj atendadis. Finfine, ĉirkaŭ ĉe noktomezo, aŭdiĝis galopado de ĉevalo sur la malmola grundo. Li alpremis sian orelon al la tero por konstati, ĉu nur unu kavaleriano alvenas. Kaj li sin pretigis.

La ulano alvenis kun trotego, portante depeŝojn. Li singardeme pririgardis, kun strečitaj oreloj. Tuj kiam li estis dek paŝojn fore, Patro Milon sin trenis transversen sur la vojo, ĝemante: "Help! Help!" La kavaleriano haltigis la ĉevalon kaj rekonis en li germanan soldaton defalintan de sur ĉevalo. Opiniante, ke tiu estas vundita, li saltis de sur la ĉevalo kaj alproksimiĝis al li sen ajna suspekto. Kiam li klinis sin malsupren la nekonato, li ricevis en la mezo de sia ventro longan kaj kurban tranĉon de sabro. Li falis sen agonio kaj baraktis en lastaj tremoj.

Ĉi-momente la normando, radianta de silenta ĝojo de maljuna kamparano, leviĝis kaj, por plezuro, fortrancis la gorĝon de la kadavro. Poste li tiris kadavron ĝis la rando de fosaĵo kaj ĵetis ĝin en la fosaĵon.

La ĉevalo ankoraŭ trankvile atendis sian posedanton. Patro Milon suprenrajdis la ĉevalon kaj forgalopis tra la ebenaĵo.

Post unu horo, li vidis du aliajn ulanojn reiri ŝultro ĉe ŝultro al komandejo. Li rekte kuris al ili, kriante ankoraŭ: “He, helpon, helpon!” La prusoj rekonis la uniformon kaj sensuspekte lasis lin proksimiĝi al ili. La maljunulo galopis, kiel obuso, inter ilin, kaj mortigis unu per sabro kaj la alia per revolvero.

Poste li buĉis la ĉevalojn, ĉar tiuj estas germanaj ĉevaloj! Poste li senhaste revenis al la kalkoforno kaj kaŝis ĉevalon en la fundo de la malhela galerio. Li demetis sian uniformon tie, reprenis siajn ĉifonajn vestojn kaj revenis al sia lito, dormis ĝis mateno de la sekvanta tago.

Dum kvar tagoj, li ne eliris, atendis la fino de la enketo komencinta. Sed la kvina tago, li ree eliris, kaj ankoraŭ mortigis du soldatojn per sama artifiko. Ekde, li ne ĉesis plu. Ĉiunokte, li sencele vagis, jen ĉi tie jen tie por mortigi prusojn, galopante sub la luno, sur dezertaj kampoj, li ŝajnis ulano kiu perdis sian vojon, ankoraŭ ŝajnis ĉasisto kiu speciale ĉaskaptis kapojn de homoj. Plenuminte sian taskon, la maljuna kavalerio lasis kadavrojn, kiuj kuŝis ĉe la vojflanko, revenis al kalkoforno por kaŝi sian ĉevalon kaj uniformon.

Ĉirkaŭ la tagmezo, kun trankvila mieno, li alportis avenojn kaj akvon al la fundo de la subtera pasejo kaj nutris ĝissate la ĉevalon, kio postulis pezan laboron.

Sed en la antaŭa nokto, li ree atakis du prusajn soldatojn, unu el kiuj, jam pretigita por defendi sin kaj tranĉis per sia sabro la vizaĝon de maljuna kamparano.

Sed li mortigis du prusajn soldatojn. Li denove reiris kaŝi la ĉevalon kaj surpotis siajn malnovajn vestojn. Tamen kiam li reiris hejmen, pro elĉerpiteco li trenis siajn paŝojn ĝis la ĉevalejo, ne havante plu forton iri al la domo.

Oni trovis lin kuŝi sur pajloj, sangmakulitan tutkorpe ...

Post finrakontado, li abrupte levis sian kapon kaj fiere rigardis la prusajn oficirojn.

La kolonelo, kiu mankaresis sian barbon, demandis lin:

— Ĉu vi havas nenion por diri?

— Ne, mi havas nenion por diri; la konto estas justa: mi mortigis dek ses prusajn soldatojn, nek pli nek malpli.

— Ĉu vi scias, ke vi estas tuj mortonta?

— Mi ne petis indulgon de vi.

— Ĉu vi estis soldato?

— Jes. Mi faris militon tiutempe. Poste, estas vi, kiu mortigis mian patro, kiu estis soldato de Napoleono I, por ne paroli pri mia plej juna filo Francois, kiun vi mortigis lastmonate apud Evreux. Vi estas ŝulda al mi, kaj mi jam ricevis repagon. Ni nun estas kvitaj.

La oficiroj rigardis unu al la alia.

La maljunulo plue diris:

— Ok por mia patro, ok por mia filo, ni likvidas konton. Mi ne pensis serĉi kverelon kun vi, mi konas neniom vin! Mi ne scias ankaŭ, de kie vi venis. Sed vi nun loĝas ĉe mi, vi donas ordonojn kaj instrukciojn, kiel estas ĉe vi. Mi nepre volas venĝi sur aliuloj. Mi bedaŭras neniom.

Rektigante sian bruston ankilozan, la maljunulo disŝovis siajn brakojn, faris ne humilegan, nek arogantan geston.

La prusoj parolis per malalta voĉo longtempe. Iu kapitano, kiu perdis ankaŭ lian filon en la lasta monato, defendis ĉi tiun grandaniman malriĉulon.

Tiam la kolonelo stariĝis kaj, alproksimiĝinte al Patro Milon, mallaŭte diris:

— Aŭdu, maljunulo, eble troviĝas rimedo, per kiu vi povas savi vian vivon, tio estas...

Sed la maljunulo tute ne aŭskultis kaj fikse rigardis la venkintan oficiron per larĝe malfermitaj okuloj. Dum la vento blovis la maldendajn vilajn harojn sur lia kranio, li faris teruran gramacon sur sia malgrasa vizaĝo tranĉvundita de sabro. Post elstariginta la bruston, li forte kraĉis sur la vizaĝon de la pruso.

Freneza de kolero, la kolonelo levis la manojn, kaj la maljunulo refoje kraĉis sur lian vizaĝon.

Ĉiuj ofuciroj stariĝis kaj krie ordonis samtempe.

En malpli ol unu minuto, ĉiam aplomba maljunulo estis puŝita al la muro kaj pafmortigita, dum li ridetis al Jean, lia pliaĝa filo, al lia bofilino kaj al du malgrandaj nepoj, kiuj rigardis lin en paniko.

Elfrancigis **Lin Leming (Ĉinio)**

_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_

Eldonas Redakcio de ***Penseo***

Ĉefredaktoro: s-ro Yida Wei (Vejdo)

Adreso: No.-3-2 de la 5-a etaĝdomo de No. 19, Wujiang St., Jiangbei Distrikto, Chongqing, 400020, Ĉinio

Tel: (023) 67095890 (hejme)

Retadreso: vejdo@163.com

Ĉiujn kontribuaĵojn al la ĉefredaktoro.

Por legi pasintajn numerojn de Penseo, vin turnu al www.elerno.cn/penlisto.htm aŭ http://gazetejo.org/eo/penseo

◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊